

Pri la instruado de la participoj laŭ la metodiko de KCE (2)

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1988 marto 18.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1988-11/SRI-1988-11-A-3-1988-03-18-Claude-kaj-Andree-Gacond-Pri-la-instruado-de-la-participoj-lau-la-metodiko-de-KCE.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

A.- Pasintan semajnon ni diskutis pri la instruado de la participoj laŭ la didaktiko, kiun praktikas Kultura Centro Esperantista, kaj ni konstatis, ke la lernolibroj tendencas alporti samtempe du nociojn, la tempan per la verbo esti, kaj la aspektan per la participo. Vi diris, ke tiu mikso de du asimilotaj nocioj estas kontraŭdidaktika.

Cl.- Jes, ĝi estas kontraŭdidaktika, ĉar ĝi malhelpas kompreni la tempajn nociojn, kiujn alportas la finaĵoj -os, -as, kaj -is per la verbo esti kaj la aspektajn signifojn, kiujn portas la finaĵoj participaj -ont-, -ant- kaj -int-. Ni montris per kelkaj ekzemploj, ke la lernantoj vere komprenas, kio estas la aspekta rolo de la participoj, se tiujn vortojn oni uzas en ekzemploj ne ligitaj al tempaj nocioj.

A.- Rememorige, ĉu vi akceptus redoni ekzemplon?

Cl.- Ne nur rememorige, sed ankaŭ por pli bone komprenigi la aspektan rolon de la participoj. Vi imagu bildojn, kiuj montras gimnastojn. Ili abundas en libroj, kiuj proponas sportajn ekzercojn. La instruisto diru al la lernantoj: Montru kurontojn! La lernantoj elektas bildojn dirante: Jen kuronto. Videble la koncerno ne kuras, sed pretiĝas praktiki la kuran arton. Tre malsimilaj aspektas la kurantoj. Same malsimile aspektas saltontoj, saltantaj kaj saltintaj geknaboj, naĝontoj, naĝantoj, naĝintoj, plongonto, plonganto kaj plonginto, ktp. Ekzameno de tiuj bildoj de sportistoj ebligas diskuti uzante participajn formojn a- aŭ o-formajn ekster la tempaj nocioj. Tiel oni metas la akcenton je la aspekto de tiuj sportistoj, ĉu ili pretiĝas al ago, ĉu ili agas, ĉu ili ne agas plu. En tiuj konversacioj kun la lernantoj frazoj kiel: "Tiu plonganto malbone falos, ĉar li faldis la gambojn, kontraŭe tiu ĉi havas bonan pozicion", neniel rilatas al tempaj nocioj. Ĉiu instruado de la participoj devus komenciĝi per tiaj diskutoj, kiuj montras la vortkreatan riĉecon de esperanto ligitan al la ses participaj sufiksoj.

A.- Pasintan semajnon vi diris, ke al ĉiu transitiva verbo ĝenerale korespondas 16 adjektivoj. Se mi bone komprenis, tiujn adjektivojn oni formas helpe de participaj sufiksoj. Ĉu vi povus kontentigi nian tiurilatan scivoiemon, donante klarigon:

Cl.- Ni prenu la transitivan verbon *frapi*, ĉar oni povas facile desegni infanon, kiun ni karakterizas per la ĉi-sekva ekzemplo-listo: *infano frapontonta kamaradon, infano frapanta kamaradon, infano frapinta kamaradon, infano frapota de kamarado, infano frapata de kamarado, infano frapita de kamarado*.

A.- Tio donas nur ses participajn adjektivojn.

Cl.- Helpe de la sufiksoj -igi kaj -iĝi ni povas ricevi la participojn de la verboj *frapiĝi* kaj *frapiĝi*.

A.- Mi komprenas. Desegnaĵoj povus facile montri *infanon frapiĝontan ĉe la kapo, infanon frapiĝantan ĉe la kapo*, kaj *frapiĝintan ĉe la kapo*.

Cl.- La *infano frapiĝonta* ne atentis pri ekzu. arbobranĉo, kiu minace pendas ĝis lia kapalteco. La infano frapiĝanta ĵus atingas la branĉon, kaj la *infano frapiĝinta* sangas kaj ploras. ekzemple.

A.- La verbo *frapiĝi*, kiu estas netransitiva, havas fakte nur tri participojn, ĉar la formoj *frapiĝota, frapiĝata* kaj *frapiĝita* ne povas ekzisti.

Cl.- Jes, ili ne ekzistas. Kontraŭe la verbo *frapi*, kiu estas transitiva, havas ses participojn. Tiuj adjektivoj *frapigonta, frapiganta, frapiginta, aŭ frapigota, frapigata kaj frapigita* priskribas nuancojn, kiujn nur multaj ekzercoj komprenigas al la lernantoj. *Infano frapigonta kamaradon* fakte ne mem frapos la kamaradon. Li nun diskutas kun aliaj provante konvinki kunulon, por ke li iru frapi la koncernan kamaradon. *Infano frapiganta kamaradon* malice ĝuas, vidante, ke lia ordono frapi la celitan kamaradon efektiviĝas. *Infano frapiginta kamaradon* ankaŭ staras ekster la konflikto eble timante, ke la *frapinto* diros al la plenkreskulo, kiu intervenas, ke iu instigis lin frapi la nun plorantan kamaradon.

A.- La diroj *kamarado frapigota de infano, frapigata de infano, frapigita de infano* ankaŭ ne estas facile kompreneblaj de la lernantoj. La viktimo de la frapo ne ricevas la frapon de la menciita infano, sed de alia.

Cl.- Ni havas do entute 6 plus 3 plus 6 adjektivojn participajn.

A.- Tio donas 15 adjektivojn. Vi diris, ke al ĉiu transitiva verbo ĝenerale korespondas 16 adjektivoj. Kiu do estas la 16-a adjektivo?

Cl.- Ĝi estas tutsimple la adjektivo *frapa*, kiu havas sufiĉe abstraktan signifon. *La frapa momento* signifas *la momento de la frapo*. La adjektivo *frapa* tendencas anstataŭi la partecipan adjektivon *frapanta* en esprimo kiel *okulfrapa*. La Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto registras la formon *okulfrapanta*, kiu tendencas maloftiĝi profite al la pli simpla *okulfrapa*.

A.- Fakte esperanto estas lingvo riĉa je adjektivoj.

Cl.- Tre riĉa. Se ni daŭrigas nian analizon de la adjektivaj derivaĵoj de la verbo *frapi*, ni devas formi frazojn kun la participoj de la verboj *ekfrapi, frapadi, frapeti, frapegi, interpfrapiĝi, prifrap, refrapi, retrofrapi, kunfrapi, piedfrapadi*, ktp, kiujn PIV registras. Ĉiam tiuj verboj naskas ĉu 6, ĉu nur 3 participojn laŭ sia aparteno ĉu al la transitiva, ĉu al la netransitiva kategorio.

A.- Vi uzas la terminojn *transitiva* kaj *netransitiva*. Sed ĉu fakte la lernantoj facile distingas tiujn du verbo-grupojn?

Cl.- Mi timas, ke ne nur la lernantoj, sed eĉ la instruantoj renkontas tiurilate malfacilaĵojn. Vi povas imagi, ke la lernantoj de instruanto, kiu ne asimilis tiun nocion, ankaŭ ne komprenos.

Venontan semajnon ni montros, kiel oni povas esti certa, ke verbo estas transitiva aŭ netransitiva, sen konsulti vortaron. Almenaŭ la kursgvidantoj devus intimiĝi kun tiuj ekzercoj, antaŭ ol helpi komencantojn.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia.

Cl.- Claude kaj Andrée GACOND diras al vi: Ĝis la reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*